V - 19635/5 (1952) N. 2, 5-8, 10-12 15.AE

ESPERANTO-POST

MONATSSCHRIFT FÜR DIE ESPERANTO-FREUNDE IN DEUTSCHLAND

Fünfter Jahrgang ★ Nr. 2 Februar 1952

LA EŬROPA LINGVO

En n-ro 11/1951 de EP mi legis la leteron s-ano Herr; ĉar mi estas juna Esperantisto vivanta en Eŭropo mi do estas Eŭropano, eĉ se mi ne estas membro de Eŭropa Junularo. Pro tio min interesas la vortoj de D-ro Robinet pri la lingva problemo. Ili nur pruvas ke li Esperanton ne konas. Leginte lian opinion pri nia lingvo kaj Basic English, mi devis memori pri notico en taga gazeto, en kiu oni diris proksimume la jenon:

La provoj traduki la verkojn kaj paroladojn de Churchill en Basic English, tute fiaskis. . . . Kiam oni tradukis lian famkonatan diron „blood, sweat and tears" (sango, ŝvito kaj larmoj), rezultis „blood, body-water and eye-wash" (sango, korp-akvo kaj okul-lavaĵo). Tiam oni rezignis.

Bonvolu kompari la Esperantan tradukon kun tiu en Basic, kaj vi scios kiu estas la Eŭropa lingvo.

J. Radam.

Generaloj sur lernejaj benkoj

Griziĝintaj sabruloj ekzercas lingvojn

Cefsidejo Eŭropo (ap.). — La sperta internacia stabo de generalo Eisenhower en la ĉefsidejo de la militaj fortoj de l' Atlanta Konvencio apud Parizo ankoraŭ estas devigata sidi sur lernejaj benkoj. Minimume 600 el ĝiaj 800 oficiroj kaj soldatoj el naŭ de la dekdu ŝtatoj de l' Atlanta Konvencio pasigas konsiderindan parton de sia tempo en klasĉambro, unue, por solvi la Babilonan lingvokonfuzon favore al la du oficialaj lingvoj de l' Atlanta Konvencio, Franca kaj Angla, due, por ekkoni la Usonajn informhelpilojn, kiuj estas la modela ekipo de la ĉefsidejo.

(Traduko laŭ raporto de „Abendpost", Frankfurt a. M.)

Multaj en- kaj eksterlandaj ĵurnaloj pritraktis lastatempe la lingvajn malfacilaĵojn rilate al Eŭropa Unuiĝo aŭ Eŭropa Armeo. Kial ni kiel Esperantistoj ne volas profiti la bonan ŝancon de la diskutata lingva problemo por propagandi Esperanton? Nia internacia aŭ supernacia Esperanto estas tute neŭtrala. Ni volas nur helpi kaj antaŭenpuŝi la internacian interkompreniĝon. Ni ĝoju, se nia lingvo estas progresigata, ĉu de okcidenta, ĉu de orienta sistemoj. Cian lingvan diskutadon ni devas partopreni kaj profiti la okazon por varbi por la lingvo Esperanto ĉe homoj de bona volo en Oriento kaj en Okcidento. Nian rekomendon de Esperanto oni neniel rajtas komenti kiel rekomendon de iu politika opinio. D-ro Job Kreutzer.

Gehässig?

Die große norddeutsche Tageszeitung „Die Welt" bringt jeweils auf der letzten Seite Kurzmeldungen aus aller Welt, und am Schluß stets eine (nach ihrer Meinung) besonders auffallende, interessante oder sensationelle. Die hat dann immer dieselbe Sonderüberschrift.

Was war nun am 12. Januar 1952 unter dieser Sonderüberschrift *„ZU GUTER LETZT"* zu lesen?

„Ein Schild sollte den Delegierten einer allaustralischen Esperanto-Konferenz den Weg zum Versammlungsraum im 8. Stock eines Gebäudes in Sidney weisen. Damit es auch jeder Teilnehmer lesen konnte, wurde das Schild in englischer Sprache abgefaßt."

Was halten Sie davon? Wollte der Verfasser dem Esperanto „eins auswischen" oder hat nur der betreffende Redakteur der „Welt" eine kleine Sensationsmeldung daraus gemacht? Nun, man kann es so und so nehmen. An und für sich ist die Sache ja gar nicht wichtig. Aber auch, bösen Willen vorausgesetzt, warum soll das gegen Esperanto sprechen? Die Einberufer der Konferenz rechneten sehr wahrscheinlich nicht nur mit Esperanto-Teilnehmern, sondern auch mit andern, z. B. Gästen, besonders Eingeladenen, Zeitungsleuten. Vielleicht sogar auch mit Esperanto-Anfängern. Und schließlich fand dies ja in Australien statt, wo man in der Hauptsache Englisch spricht. Dürfen sich Esperantisten denn nicht mehr ihrer Alltagssprache bedienen? Wie hätte der Kommentar gelautet, wenn es andersrum gewesen wäre? Jfb.

„Kiu bone ŝmiras, tiu bone veturas."
Foto: Schmidt

Internacia ski-renkontiĝo en Titisee (Germanio)

Sub la gvido de Michel Schmidt la GEJ (Germana Junular-Organizo) aranĝis de la 26. 12. 1951 ĝis la 1. 1. 1952 belegan skikunvenon en Titisee, en la admirinda Nigra Arbaro. Venis junaj partoprenantoj el Danlando, Svislando, Francujo kaj Germanujo.

Oni veturis per skioj en la monta ĉirkaŭejo, vidis diversajn interesajn son- kaj kolorfimlojn, faris diskutojn pri gravaj temoj, kantis Esperantajn kantojn, festis la jarŝanĝon kaj estis ĉiam gaja kaj feliĉa.

Certe neniu el la partoprenintoj forgesas tiun kunvenon kaj ĉiu estas dankema al la laborema gvidanto.

Irmtraud Brandt.

IFEL-(Fervojista) kongreso en Lindau

Jam nun oni povas aliĝi al la 4-a internacia fervojista kongreso okazonta de 25a—30a de Majo en Lindau (Lago Konstanca). La kotizo estas: 10 DM, familiano 5 DM, por postkongresa ekskurso 5 DM. Havigu al vi por ĝi jam antaŭe vizojn por Svislando kaj Aŭstrio. Pro pli detalaj informoj bonvolu vin turni al la OKK, Museumstr. 39, Hamb.-Altona, Eisenbahndirektion.

Esperanto Weltsprache ... Welthilfssprache

Den Ausführungen der beiden Herrn Eugen Reiche und Bernhard Vogel in Nr. 1/1952 ist in jeder Beziehung zuzustimmen. Ich füge hinzu:

Die Einführung des Esperanto oder irgendeiner andern Sprache als einzige Weltsprache ist eine technische Unmöglichkeit und wird es immer bleiben. Interessiert an der Einführung einer internationalen Kunstsprache sind lediglich die Teilnehmer am internationalen Verkehr (im weitesten Sinne, einschließl. des theoretisch-ideellen Gedankenaustausches). Die größere Hälfte der Bevölkerung eines jeden Landes (Bauern, Fabrikarbeiter, Handwerker, kleine Gewerbetreibende usw.) werden nie Interesse an einer internationalen Sprache haben, und zwar mangels irgendwelcher Beziehungen zum Auslande. Keiner Instanz irgendeines Landes stehen Zwangs- oder sonstige Mittel zur Verfügung, um die nicht interessierte größere Bevölkerungshälfte zur Erlernung einer zweiten Sprache neben oder gar anstatt der Muttersprache, noch viel weniger zu deren Anwendung zu bewegen.

Es wäre aber auch unerwünscht, Esperanto als Weltsprache einzuführen. Denn, wäre diese Einführung wirklich gelungen, dann würde diese Sprache sich in jedem Lande anders, nach den dort maßgebenden Idiomen und Sprachinstinkten, weiterentwickeln, und nach wenig hundert Jahren stände das dann gesprochene Esperanto in jedem einzelnen Lande in dem ungefähren Verhältnis wie beispielsweise das Deutsch der Edda zu der Sprache Goethes. Der Esperanto sprechende Türke würde sich dann mit beispielsweise dem Esperanto sprechenden Japaner nicht mehr verständigen können, da die Weiterentwicklung der Sprache in jedem Lande - wie gesagt - eine verschiedene sein müßte. Es müßte also nach einiger Zeit eine neue Welthilfssprache erdacht werden.

Nur die Beschränkung des Esperanto als Welthilfssprache, reserviert für den verhältnismäßig kleinen Bevölkerungsteil der an einer internationalen Sprache Interessierten, wird es ermöglichen, die notwendige Weiterentwicklung des Esperanto (Bildung neuer Fachausdrücke) vor einer drohenden Verwilderung und Verwirrung zu schützen. Dieses Ziel kann nur erreicht werden durch eine entsprechende Erweiterung und vorzügliches Funktionieren der „Akademie" einerseits und durch absolute Selbstdisziplin aller Esperantisten andererseits. Nun stelle man sich aber einmal die Aufgabe und den Einfluß dieser „Akademie" auf, sagen wir einmal, eine Milliarde Esperanto sprechender Menschen vor! Seien wir also zufrieden, wenn es unserer Bewegung gelingen wird, Esperanto als Welthilfssprache auf den Thron zu heben.

Dr. jur. H. Kallfelz, Koblenz.

ESPERANTO kaj la RUSA LINGVO

Referato de kaplano dipl.-esp. Ludwig Thalmaier en la Munkena universitato (16. 2. 1951)

Komparante lingvon kun konstruaĵo oni povas diri: Kio estas por konstruaĵo la ŝtonoj kaj la brikoj, tio estas por lingvo la vortoj. Kiel la cemento kunigas la ŝtonojn, tiel la gramatiko kunigas la vortojn. Kiam Zamenhof surprenis la taskon krei novan lingvon, estis lia ĉeftasko krei vortojn por la nova lingvo. Diversaj eblecoj ekzistis. Zamenhof havis en la komenco la ideon sendepende de iu jam ekzistanta lingvo krei tutajn novajn vortojn, kiuj apartenis al nenia lingvo. Li volis formi plej mallongajn vortetojn kiel ba, ca, da, be, ce, ab, ac, ad kaj arbitre fiksi ĉies sencon difinitan, li volis krei lingvon sur la aprioria elirpunkto. Antaŭ Zamenhof oni jam faris lingvoprojektojn laŭ la aprioria sistemo, ekz. Dalgarno, Wilkins, Gablentz. Sed Zamenhof baldaŭ konstatis: Ne estas eble! Tiajn vortojn eĉ li mem ne povis lerni. Kaj li trovis la solvon: la vortoj de internacia lingvo devas esti prenataj el vivantaj lingvoj, oni devas ĉerpi la vortaron el komuna fonto de eŭropaj lingvoj! Kaj li konstatis, ke vortaro latina-germana estus la plej internacia. Angloj, Francoj, Hispanoj, Italoj, Holandanoj, Germanoj, Skandinavoj kaj eĉ Slavoj konus ĝiajn elementojn kiom eble plej multajn. Vortoj kiel horo, karto, vino, bruna apartenas samtempe al dektri ĝis dudek lingvoj. Elekto devus esti kvazaŭ voĉdonado de l' plejmulto. En la revuo „La Esperantisto" n-ro 36 (1891) skribas Zamenhof: „La lingvo Esperanto estas kreita en la sekvanta maniero: estas prenitaj la plej konataj vortoj de la lingvoj ariaj kaj tre garde preparitaj tiel, ke ili alformiĝu al absolute regula gramatiko, ortografio kaj praktika uzebleco kaj ke la vortoj kaj formoj ne venu en kolizion unu kun alia" (OV p. 96). La lasta penso estas atentinda! Zamenhof eĉ preferis neinternacian vorton al internacia vorto, se estis la danĝero, ke per la internacia vorto povus fariĝi miskompreno. Ekzemple li prenis el la greka lingvo la vorton „kaj", kiu ne ekzistas en aliaj lingvoj kaj li ne prenis la internacian vorton „e" aŭ „et", ĉar „e" li bezonis por la finiĝo de l' adverbo kaj „et" por la sufikso de malgrandeco (OV p. 115). Zamenhof ankaŭ ne volis flati al iu nacio. Iam iu plendis, ke Esperanto ne estas sufiĉe internacia, ĝi enhavas preskaŭ neniun vorton rusan. Aliaj plendis, ke la unua lernlibro de Esperanto eliris en lingvo rusa (OV p. 116). Alia plendis, ke Esperanto havas tro multe da francaj vortoj. Sed Zamenhof respondis, ke tia aŭ alia formo estis elektata ne pro pli granda amo al la francoj, sed simple nur pro oportuneco kaj pli internacia kompreneblec (OV p. 526).

Do laŭ internacieco, oportuneco, belsoneco Zamenhof konstruis la vortaron de Esperanto. Kaj sian vortaron li publikigis en la ĉefverko de la Esperantismo, en la Fundamento. Estas la Universala Vortaro, kiu entenas la 1800 unuajn Esperanto-radikojn kun traduko en kvin lingvoj, en franca, angla, germana, rusa, pola lingvoj.

La Universalan Vortaron mi nun tralaboris laŭ jenaj vidpunktoj: Unue: Kiom da Esperanto-vortoj estas kompreneblaj por ruso kaj kial? Due: Cu la rusa lingvo influis Zamenhof ĉe la konstruado de la vortaro kaj de la gramatiko? Trie: Aliaj rusaj influoj je Esperanto.

Laŭ mia kalkulado estas de la 1800 vortoj de la UV 472 kompreneblaj por ruso, do pli ol kvarono el la vortaro aŭ 26,3 procentoj el ĉiuj vortoj. Mi mem estis surprizita pri la rezulto. Sed estas fakto, en speciala listo mi notis la 472 vortojn en rusa lingvo kaj en Esperanto.

La kialo? La rusa lingvo apartenas al la indogermana lingvofamilio, al kiu ankaŭ apartenas la germanaj kaj romanaj lingvoj, tial ekzistas en tiuj ĉi lingvoj diversaj komunaj vortradikoj. Pro tio estas por ruso ankaŭ kompreneblaj vortoj kiel ekzemple:

nazo	нос	nokto	ночь	sidi	сидеть	vidi	видеть
nova	новый	ses	шесть	tri	три		

Alia kialo estas: Grekkatolikaj misiistoj venis al Ruslando, per ili penetris multaj grekaj vortoj en la rusan lingvon. Komercistoj el la orientromana imperio, en kiu oni parolis la grekan lingvon, venis al Ruslando, kun ili multaj grekaj vortoj en la rusan lingvon. Sed la greka lingvo ankaŭ penetris en la okcidentajn lingvojn, tial oni havas en la okcidentaj lingvoj kaj en la orientaj slavaj lingvoj internacian grekdevenan vortaron. Grekdevenaj Esperanto-vortoj kiel demono, diablo, eĥo, epoko, gramatiko, heroo, karaktero, klimato, monarĥo, sceptro estas tial sen malfacilaĵoj kompreneblaj por ruso.

Alia kialo. Dum la mezepoka tempo la latina lingvo estis la lingvo de la kleruloj. Inter la okcidentaj landoj kaj inter Ruslando estis ĉiam spirita kaj kultura interŝanĝo. Tiamaniere ankaŭ penetris latinaj vortoj en la rusan lingvon kiel en la aliajn okcidentajn lingvojn, el kiuj Esperanto ĉerpis la vortradikojn. Tial multaj latindevenaj Esperanto-vortoj estas kompreneblaj por ruso, kiel ekzemple: figo, fronto, imperio, intima, kapelo, maro, misio, premio, provinco, titolo, vino.

Alia kialo: Dum la 18-a jarcento, sub la imperiestro Petro I-a la Granda (1682 — 1725), la okcidenteŭropa influo je Ruslando estis grandega. La imperiestro invitis al sia lando francajn kaj germanajn teĥnikistojn, scienculojn, kamparulojn, laboristojn. Kun ili penetris multaj francaj kaj germanaj vortoj en la rusan lingvon. Tial multaj francdevenaj Esperanto-vortoj estas kompreneblaj por ruso, ekzemple: bastiono, bufedo, emajlo,

Esperanto Weltsprache ... *Welthilfssprache*

Ich bin mit den Äußerungen des Herrn Dr. Żurek, betreffend die künftige weitere Verbreitung unserer z. Z. schon bestehenden Weltsprache, vollständig einverstanden. Die Einheits-Weltsprache war und ist in allen zivilisierten Ländern als dringendes Bedürfnis, besonders für die nur einer Sprache fähigen Menschenmassen, ins Leben gewachsen, kein Mensch kann nennenswerte Nachteile, sondern nur Vorteile haben. Das teilweise Sprachengewirr wird allmählich verschwinden und auch die Muttersprache der Länder hiervon beeinflußt. Die Dolmetscher, welche ja nur wenige nationale Sprachen beherrschen können, werden erspart. Die Vereinten Nationen der ganzen Erde können sich, wenn auch soldatisch, einst unter einer Kriegs-Verhinderungs- und Friedensliga, schon aus göttlich-religiösen Gründen dem Nebenmenschen anderer Länder gegenüber, in einer Sprache friedlich einigen.

Der Fanatismus und Größenwahn herrschsüchtiger und mordlustiger Rassenmenschen wird in glücklichere menschenwürdigere Bahnen gleiten, so daß einzelne fremde Nationalsprachen keinen Haß mehr erwekken werden. Die Muttersprachen aller Länder, samt ihren vielen unschönen Dialekten, können ja noch einzelne Generationen hindurch bestehen und von Liebhabern gepflegt werden, jedoch auch über diese waltet das Schicksal, denn immer rastlos vorwärts strebt der uns von Gott gegebene Geist, es ist ihm keine Frist oder ein absehbares Ende gegeben. Das Alte stürzt, wir können daher, neuen Propheten glaubend, unsere liebgewordene Weltsprache entsprechend fördern.

J. Bauer, Reutlingen.

Übersetzungsaufgabe 22

Gute Geduld

Ein Franzose ritt eines Tages auf eine Brücke zu, die sehr schmal war. Ein Engländer ritt von der anderen Seite her, und als sie auf der Mitte zusammenkamen, wollte keiner dem anderen Platz machen. „Ein Engländer geht keinem Franzosen aus dem Wege", sagte der Engländer. „Par Dieu", erwiderte der Franzose, „mein Pferd ist auch ein Engländer. Also lassen Sie Ihren Engländer, auf dem Sie reiten, meinem Engländer, auf dem ich reite, aus dem Wege gehen. Der Ihrige scheint ohnehin der jüngere zu sein." Allein der Engländer sagte: „Ich kann warten, ich habe jetzt die schönste Gelegenheit, die heutige Zeitung zu lesen, bis es Ihnen gefällt, Platz zu machen." Also zog er kaltblütig, wie die Engländer sind, eine Zeitung aus der Tasche und las darin eine Stunde lang auf dem Roß und auf der Brücke. Nach einer Stunde, als er fertig war und die Zeitung wieder zusammenlegen wollte, sah er den Franzosen an und sagte: „Nun?" Aber der Franzose hatte den Kopf auch nicht verloren, sondern erwiderte: „Engländer, seien Sie so gut und geben Sie mir jetzt Ihre Zeitung auch ein wenig, daß ich ebenfalls darin lesen kann, bis es Ihnen gefällt, auszuweichen." Als der Engländer die Geduld seines Gegners sah, sagte er: „Wissen Sie was, Franzose? Kommen Sie, ich will Ihnen Platz machen." Also machte der Engländer dem Franzosen Platz.

J. P. Hebel

Für die drei besten Übersetzungen gibt es folgende Preise:

1. **Niko kaj Nina**
2. **Alpenschönheiten**
3. **Esperanto in der Tasche**

Und nun ans Werk — es ist interessant und man lernt etwas dabei. Letzter Einsendetag: 15. März 1952.

---

eskadro, partero, portreto, etaĝo, furaĝo, gazeto, inĝeniero, kajuto kaj germandevenaj vortoj kiel grafo, gasto.

Ĉu Zamenhof esperantigis ankaŭ originalajn rusajn vortojn, tio estas vortoj, kiuj ne ekzistas en tiu ĉi formo en la romanaj kaj germanaj lingvoj? Jes! Laŭ mia kalkulado estas entute nur 24 vortoj, do nur 1,3 procentoj el la 1800 de la Universala Vortaro. La plej konataj estas jenaj (mi ĉiam citas la Esperanto-vorton kaj poste la rusan vorton):

vi	вы	ĉerpi	черпать
krom	кроме	ĉapo	шапка
nepre	непременно	kolbaso	колбаса
pra	пра	vosto	хвост
klopodi	хлопотать	vualo	вуаль
prava	правый	bulko	булка

Malpli ofte estas uzataj jenaj:

banto	бант	Schleife
barakti	барахтаться	zappeln
barĉo	борщ	Rübensuppe
bazaro	базар	Markt
gladi	гладить	plätten
kaĉo	каша	Brei
kartavi	картавить	schnarren beim Sprechen
klavo	клавиш	Klaviertaste
krano	кран	Zapfen
kreno	хрен	Meerrettich
svati	сватать	freien, werben

Ekzistas nun diversaj Esperanto-vortoj, kiuj sendube estas german-, roman- aŭ grekdevenaj, kiuj estis surprenataj de la rusa lingvo, sed en iom ŝanĝita formo. Laŭ mia opinio Zamenhof kelkfoje prenis ĉe diversaj Esperanto-vortoj ne la originalan formon, sed jenan formon, kiun la vorto havas en la rusa lingvo. Tiaj vortoj estas ekzemple:

citro	цитра	Zither
gvardio	гвардия	Garde
kamforo	камфора	Kampher
kaŝtano	каштан	Kastanie
keglo	кегля	Kegel
klarneto	кларнет	Clarinette
paletro	палитра	Palette
perlamoto	перламутр	Perlmutter
poŝto	почта	Post
skarlato	скарлатина	Scharlach

La rusa vortaro do nur malmulte influis Esperanton. Sed la influo estas pli forte rimarkebla sur aliaj kampoj!

Ofte la lingvoj havas precizan vortordon. Sed la vortordo de la rusa lingvo estas tre libera kaj tiu ĉi libereco ankaŭ influis Esperanton.

(Finota.)

An Frl. Roelcke in Berleburg!

22. November 1951

Es war für mich eine große Überraschung, als ich erfuhr, daß Ihre 16- bis 17jährigen Schülerinnen beabsichtigten, meine fünf von Ihnen in Berleburg und Laasphe eingerichteten Vorträge zu übersetzen, obwohl sie Esperanto erst ein Jahr und wöchentlich einmal erlernten. Ich zweifelte daran, daß die jungen Mädchen Elisabeth, Gertrud und Ruth dazu fähig seien; aber zu meiner großen Überraschung sah ich, daß sie vorzüglich übersetzten, sogar viel besser als andere Übersetzer. Ich beglückwünsche Sie und Ihre Schülerinnen herzlich und hoffe, daß mein Besuch in Ihrer Stadt bald Früchte trägt. Ich danke Ihnen und den jungen Übersetzerinnen nochmals, die die jüngsten Übersetzer waren, die ich jemals während meiner Reise durch ganz Europa hatte.

Ich grüße Sie herzlich!
gez. Dr. Tadros Megalli

Die in obigem übersetzten Schreiben genannten Personen sehen Sie nun hier im Bilde.

El mia TAG-LIBRO

tra Nederlando - Anglujo — Danujo kaj Svedujo

De Michel Schmidt

Merkredo, 22a de aŭgusto 1951

Je la 22-a mi sonorigas ĉe la pordo de junaj samideanaj geedzoj en Freiburg. Eklumiĝas, de interne aŭdiĝas laŭta voĉobruo. Jen gaja societo: la gastigantoj mem, ŝercemaj kaj parolemaj kiel ĉiam. Apude sidas iliaj du Francaj gastoj, Petro L. kaj edzino el Nancy, kiuj tuthazarde pasigas sian libertempon tie. Jen „Fermont", sveda studento el Uppsala, pro sia barbo kaj rapidparolemo sendube la plej interesa persono de tiu vespero. Li akompanos min norden ĝis Kolonjo. Apud li sidas Annerose, diligenta kaj atenta. Kaj Franz, iom silentema. Kun la laste-alveninto vi konatiĝos ankoraŭ dum la venontaj tagoj. Nun eksonas konataj melodioj, akompanataj per buŝharfo kaj gitaro. „Cu ni dŝiru sen esper'...?"

Sabato, 25a de aŭgusto

Kolonjo: Adiaŭ Fermont, vi estis agrabla kunulo! Kaj dumnokte sur la aŭtostrato, kiam mia laca cerbo preskaŭ ekdormis, kaj en Frankfurt, kiam via nacieco malfermis la fermitan pordon de la Sveda konsulejo. Nun vi „aŭtostopos" norden, dum mi turniĝas okcidenten. Eble ni revidos unu la alian en Svedujo. Do: „ĝis la!" — El la kvankam grave vundita, tamen vivoplena metropolo de la Rejno mi post kelkaj horoj atingas la German-Belgan landlimon apud Aachen. La unuaj el multaj stampiloj en la pasporto pretendas atesti, ke mi troviĝas en fremda lando. Ĉio mensogo! Je la 17-a mi atingas Bruselon, artplena ĉefurbo de Belgujo. Mi demandas el la fenestro: „Connaissez-vous la rue Chopin?" — Ne, nek li nek alia konis ĝin, sed je la 18-a mi alvenas ĉe mia Belga amiko. Elkoran bonvenon! Hm — ĉu vi venas aŭtomobile? Petro estas popolinstruisto kaj instruas ankaŭ geografion. Tial ni pridiskutas ĝis frumatene vojaĝplanon tra Belgujo. Ne preterlasu viziti la plej ŝatatan (pro tio ke li allogas tiom da fremduloj) civitanon de Bruselo: Manneken-Pis!

Merkredo, 29a de aŭgusto

Hodiaŭ s-ro Cortvriendt kaj mi veturis de Antwerpen al Gent, beleta urbeto kun alta Belfrido. Ni vizitas maljunan samideaninon, eksinstruistinon, en kies hejmo pendas fotografaĵoj de diversaj Universalaj Kongresoj. Tre afable ŝi gvidas nin tra tiu interesa urbo, kiun ni forlasas post bonega tagmanĝo en la restoracia kelo de la Belfrido. Vespere ni estas en Brugge, kiu estas plejrajte nomita la „Venecio de la Nordo" pro siaj multnombraj malnovaj belaj domoj, kanaloj kaj pontoj. Sed ankoraŭ pli bela ĝi fariĝas vespere, kiam miloj da lumigiloj heligas la plej romantikajn ejojn kaj donas al la urbo tiun eternan belecon. Kaj kiam komenciĝas koncerto de 47 sonoriloj en la Belfridoturo, mi havas la impreson esti proksima al la paradizo. Longe ni sidis ankoraŭ ĉe la Esperanto-familio Roose, diskutante pri tio kaj tio. Nur matene ni vizitas niajn litojn en la domo de fervora leŭtenanto-samideano Iserentant. Dankon ankoraŭ pro la bonega matenmanĝo, kiun vi preparis por ni, kun slipo „bonan apetiton".

Bruselo: Manneken-Pis allogas turistojn
Rotterdam.
Mia gvidanto en la Zamenhof-Strato
Fotoj: Schmidt

Sabato, 1a de septembro.

Aventura tago, dum kiu mi veturis de Rotterdam ĝis West-Graftdijk. En Rotterdam, urbo je naŭdek procentoj detruita, s-ro de Goeij gvidis min ĉien kaj al la Esperantostrato. Posttagmeze ni forveturas. En la malnova universitata urbeto Delft eksalutas min Helmi Veldhuyzen, juna kaj fervora sekretariino de TJO. Post vizito al la pacpalaco en den Haag ni kompreneble ne preterlasas viziti en Scheveningen la redaktoron de „Heroldo", Teo Jung. Ni renkontas ankaŭ lian filon kaj lian fratinon Maria, venintan por vizito el Hispanujo. Ni daŭrigas la veturadon tra Haarlem kaj Amsterdam al West-Graftdijk. En tiu eta vilaĝeto apud Purmerend troviĝas la centro de Tutmonda Junular-Organizo kaj loĝas la redaktorino de „La Juna Vivo", fraŭlino Kool. Post viglaj diskutoj ĝis la unua matene, ĉiu retiriĝas en la kusenojn, kaj mi dolĉe dormas en la helan dimanĉon.

Jaŭdo, 6a de septembro

Ses tagojn mi jam troviĝas en Nederlando, kaj dum la lastaj kvin en Bilthoven kiel gasto de la simpatia staciestro s-ro Ligtermoet. Sed hodiaŭ estas la tago de forveturo al Anglujo! Frumatene alvenis ankoraŭ poŝtkarto el Londono, en kiu samideano, kiun mi petis pri tranoktado, estis skribinta: „Venu, la 7-an kaj 8-an mi lasos la ŝlosilon sub la tapiŝo antaŭ la pordo". Je la 21-a montriĝas, ke mankas ankoraŭ devizoj por la unuaj elspezoj en Anglujo. Sed s-ro Ligtermoet „savas la situacion", telefonante al Hook v. Holland kaj aĉetigante por mi la bezonatan pundon. Je la 22-a mi por la unua fojo post foriro el Konstanz eniras vagonaron. En la kupeo sidas ankaŭ angla civilulo en uniformo, kiu libertempos hejme. Ankaŭ li dedestas (?) militojn. Alvenas finstacio Hook v. Holland. La homamaso elverŝiĝas el la trajno kaj moviĝas tra la doganejaj haloj. Supraĵa ekzameno de pasportoj, devizoj kaj pakaĵoj. Ni iras laŭ direktilo „To the boats". Nigra nokto ekstere, iomete heligita per kelkaj lampoj. Tie oni ankoraŭ enŝipigas kelkajn aŭtomobilojn; unu el ili ŝvebas alte inter tero kaj ĉielo. La grandega boato apartenas al British Railways, kaj ĉio estas Angla: servistoj kaj lingvo. Precize je meznokto la ŝnuroj estas malfiksataj de la kajo, la pontoj retiriĝas, la ŝipmotoroj ektremigas la ŝipon. Lasta sirena fajfo salutas Nederlandon. Adiaŭ kontinento! Post vana provo surferdeke trabori la nigrecon de la nokte, ankaŭ mi retiras min en mian kajuton kaj baldaŭ ekdormas. La lasta penso estis: morgaŭ je la 6-a vi albordiĝos en Anglujo. (Finota.)

Jahreshauptversammlung der Rhein-Main-Ligo

in Rüsselsheim am 22. und 23. März 1952

Am Samstag, dem 22. März, 19 Uhr, **interner Unterhaltungsabend.** Das Programm wird von der Laienspiel-Gruppe Groß-Frankfurt und von der Rüsselsheimer Gruppe bestritten.

Am Sonntag, dem 23. März, 9 Uhr, **Arbeitssitzung** mit folgender Tagesordnung: Vorstandsbericht, Kassenrapport, Berichte der einzelnen Gruppen, Anträge zum Bundestag in Düsseldorf, Neuwahl des Ligo-Vorstandes und Verschiedenes. Nach der Sitzung **gemütliches Zusammensein.** Anmeldungen wegen der notwendigen Quartiere an Else Hoffmann, Frankfurt a. M., Arnsburger Str. 2. Wer irgend kann, komme zu uns!

Josef von Eichendorff

El la vivo de Netaŭĝulo

ROMANTIKA NOVELO · TRADUKO EL LA GERMANA LINGVO DE PAUL BENNEMANN

(Sesa daŭrigo)

Iom kaj iom revenante al mi mem, mi aŭdis kvazaŭ en sonĝo, ke ambaŭ pentristoj apud mi ankoraŭ parolis, kaj la birdoj kantis super mi; kaj la matenradioj briletis tra miaj fermitaj okuloj, tiel ke interne en mi fariĝis tiel hele-malhele, kiel se la suno lumas tra ruĝsilkaj kurtenoj. „Come è bello!" mi aŭdis jen elvokata tute apud mi. Mi malfermis la okulojn kaj ekvidis la junan pentriston, kiu en la brileganta matenlumo staris kliniĝinta super min, tiel ke preskaŭ nur la grandaj nigraj okuloj estis videblaj inter la malsupren pendantaj harbukloj.

Rapide mi saltstariĝis; ĉar la hela tago jam estis veninta. Sinjoro Leonhard ŝajnis esti en malbona humoro; li havis du sulkojn de l' kolero sur la frunto kaj malkviete admonegis al formarŝo. Sed la alia pentristo forskuis siajn harbuklojn el la vizaĝo kaj, bridante sian ĉevalon, li kantetis kviete melodion, ĝis kiam fine Leonhard subite ekridis laŭte, kaptis rapide botelon starantan ankoraŭ sur la herbejo kaj verŝis la reston en la glasojn. „Je feliĉa alveno!" li kriis. Ili kunpuŝis la glasojn, kaj tio donis belan sonon. Poste Leonhard ĵetis la malplenan botelon alten en la matenruĝon, tiel ke brilegis gaje en la aero.

Fine ili sidiĝis sur siajn ĉevalojn, kaj vigle mi ree apudmarŝis. Guste antaŭ ni kuŝis nesupervidebla valo, en kiun ni nun malsuprenpaŝis. Tie estis muĝado kaj briletado kaj jubilado kaj fulmado! En mia animo estis tiel malvarmete kaj gaje, kvazaŭ mi devus flugi de la monto for en la belegan landon.

Kvara ĉapitro

Nun adiaŭ, muelejo kaj kastelo kaj pordisto! Nun mi rapidis, ke la vento fajfis ĉe mia ĉapelo. Dekstre kaj maldekstre vilaĝoj, urboj kai vitoĝardenoj preterflugis, ke trembrilis antaŭ la okuloj. Post mi la du pentristoj en la kaleŝo, antaŭ mi kvar ĉevaloj kun belega poŝtveturigisto, mi mem alte supre sur la direktejo, tiel ke ofte mi estis suprenpuŝata je ulno.

Jen kiel tio okazis: Kiam ni alvenis antaŭ B., jam ĉe la vilaĝo longa, malgrasa, mizantropa sinjoro en verda frisjaketo venas kontraŭ ni, faras multajn riverencojn antaŭ sinjoroj la pentristoj kaj enkondukas nin en la vilaĝon. Tie sub la altaj tilioj antaŭ la poŝta domo jam staris belega kaleŝo kun kvar jungitaj ĉevaloj. Sinjoro Leonhard diris dumvoje, ke mi estas elkreskinta el miaj vestoj. Tial rapide li eltiris aliajn el sia valizo, kaj mi devis min vesti per novaj, belaj frako kaj veŝto, kiuj tre donis al mi aspekton de nobleco, malgraŭ ke ĉio estis por mi tro longa kaj tro vasta kaj vere pendis ĉirkaŭ mi. Mi ricevis ankaŭ tutnovan ĉapelon, brilegantan en la sunlumo kvazaŭ surŝmirita per freŝa butero. Tiam la fremda, mizantropa sinjoro prenis la du ĉevalojn de la pentristoj je la bridoj, la pentristoj saltis en la kaleŝon, mi sur la direktejon, kaj jen ni jam forflugis, kiam ĝuste la poŝtestro kun la noktoĉapo elrigardis el la fenestro. La veturigisto blovis gaje la kornon, kaj tiel ni vigle eniĝis en Italujon.

Por diri la veron: tie supre mi havis belegan vivon, kiel birdo en la aero, kaj tamen ne estis necese flugi mem. Mi havis ankaŭ nenion por fari, escepte sidi tage kaj nokte sur la veturigista benko kaj ĉe la gastejoj kelkfoje elporti manĝaĵon kaj trinkaĵon al la kaleŝo; ĉar la pentristoj nenie eniris, kaj dumtage ili tiel fermis la fenestrokurtenojn de la kaleŝo, kvazaŭ la suno volus pikmortigi ilin. Nur kelkiam sinjoro Guido etendis sian belan kapeton el la kaleŝfenestro kaj afable diskutadis kun mi kaj poste mokridis sinjoron Leonhardon, kiu ne volis permesi tion kaj ĉiufoje ĉagreniĝis pro la longaj diskutoj.

Kelkfoje mi kaj miaj sinjoroj preskaŭ estus malpaciĝintaj: La unuan fojon, kiam en bela, stelhela nokto mi supre sur la veturigista benko ekludis violonon, kaj poste pro la dormado. Sed tio efektive estis tute mirinda! Mi ja volis kiel eble plej precize rigardi Italujon kaj ĉiun kvaronhoron vaste malfermigis la okulojn. Sed apenaŭ mi estis tempeton tiel rigardinta, tuj la dekses ĉevalpiedoj antaŭ mi intermiksiĝis kaj malordiĝis tien kaj ree kaj kruce kiel fadenoj de refo, tiel ke tuj reen mia vido malklariĝis, kaj fine mi falis en teruran kaj senĉesan dormadon, kontraŭ kiu nenio helpis plu. Cu estis tago aŭ nokto, ĉu pluvo aŭ sunlumo, Tirolujo aŭ Italujo — mi pendis de sur la benko nun dekstren, nun maldekstren, nun dorsen; kelkfoje mia kapo eĉ falmontris teren per tia rapideco, ke mia ĉapelo flugis de l' kapo malproksimen kaj sinjoro Guido en la kaleŝo laŭte ekkriis.

Tiel mi estis travojaĝinta — mi mem ne scias kiamaniere — tra la duona Italujo, kiun tie ili nomas Lombardion, kiam en bela vespero ni haltis antaŭ kampara gastejo. La poŝtĉevaloj estis menditaj en la ĉi-apuda staciovilaĝo, por veni

Das Gute spricht in schlichten, klaren Worten,
das Böse hüllt sich gern in Rätsel ein.

Raupach

La bon' parolas simple, klaravorte,
Malbon' enigme ŝatas kaŝi sin.

nur post kelkaj horoj; sinjoroj la pentristoj tial eliris kaj estis kondukataj en apartan ĉambron por tie iomete ripozi kaj skribi kelkajn leterojn. Sed mi tre ĝojis pri tio kaj tuj iris en la gastoĉambron, por post longa tempo ree manĝi kaj trinki en vera trankvilo kaj komforto.

Tie aspektis sufiĉe malzorgite. La servistinoj iris kun nekombitaj haroj kaj havis la nenoditajn koltukojn malorde pendantaj ĉirkaŭ sia flava felo. Ĉe ronda tablo sidis en bluaj surĉemizoj la servistoj de la domo, vespermanĝis kaj kelkiam rigardaĉis min elflanke. Ili ĉiuj havis mallongajn, dikajn harplektaĵojn kaj aspektis tre noblaj kiel junaj sinjoretoj.

Jen vi estas nun, mi pensis en mi kaj daŭrigis fervore manĝi, jen vi estas nun en la lando, el kiu ĉiam venis tiuj kuriozaj homoj al sinjoro nia pastro, kun muskaptiloj kaj barometroj kaj bildoj: Kiom do la homo lernas, kiam foje li eliras el malantaŭ la forno!

Ĝuste dum ke mi tiel manĝas kaj meditas, subite vireto, sidinta ĝis nun en malhela loko de l' ĉambro apud sia glaso da vino, rapidglitas el sia angulo al mi kiel araneo. Li estis tute mallonga kaj ĝibhava, sed havis grandan, malbelegan kapon kun longa romanà aglobeka nazo kaj maldensa ruĝa vangobarbo, kaj liaj pudritaj haroj disstaris ĉiuflanken, kvazaŭ ventego ilin trablovis. Krome li portis malnovmodan senkoloriĝintan frakon, mallongan pluŝan pantalonon kaj silkajn ŝtrumpojn tute flaviĝintajn. Iam li foje estis en Germanujo kaj opiniis, ke mirinde bone li sciis la germanan lingvon. Li sidiĝis apud mi kaj demandis nun tion, nun tion, senĉese flarante tabakon: Ĉu mi eble estas la servitore? Kiam ni arrivare? Ĉu ni vojaĝas al Roma? Sed mi mem ne sciis ĉion ĉi kaj ankaŭ neniel povis kompreni lian lingvaĉon.

„Parlez-vous français?" fine en mia embaraso mi diris al li. Li skuis la grandan kapon, kaj tion mi tre ŝatis; ĉar mi ankaŭ ja ne sciis la francan lingvon.

Sed ĉio ĉi neniel helpis. Li nepre estis direktinta sian scivolemon sur min, li demandis kaj demandis ĉiam denove. Ju pli ni paroladis, des malpli komprenis unu la alian; fine ni ambaŭ jam varmegiĝis, tiel ke ŝajnis al mi kelkfoje, kvazaŭ la signore volus haki min per sia aglobeka nazo, ĝis fine la servistinoj, aŭskultintaj la babilonan diskutadon, forte ridis pri ambaŭ ni. Sed mi rapide formetis tranĉilon kaj forkon kaj eliris antaŭ la dompordon. Ĉar en la fremdlando mi sentis min kaj mian germanan langon kvazaŭ mergitaj mil klaftojn profunden en la maron, kaj ĉiuspecaj nekonataj vermaĉoj serpentumis kaj bruadis tie en la soleco ĉirkaŭ mi kaj rigardaĉis kaj volis buŝkapti min.

Ekstere estis varma somernokto, vere konvena por promenadi. De la vitejoj alvenis kelkiam la kantado de vinrikoltisto, interdume fulmis nun kaj nun en la malproksimo, kaj la tuta regiono tremis kaj murmuretis en la lunlumo. Kelkfoje eĉ ŝajnis al mi, kvazaŭ longa malhela figuro preterglitis post la avelarbetaĵoj antaŭ la domo kaj rigardis tra inter la branĉoj; poste ĉio subite estis ree silenta.

Ĝuste tiam sinjoro Guido elpaŝis sur la balkonon de l' gastejo. Li ne rimarkis min kaj ludis tre lerte sur citro, kiun kredeble li estis trovinta en la domo, kaj poste kantis ĉi-kune kiel najtingalo:

„Kiam homa bru' silentas,
tero kantas per la arboj
kaj la kampoj per la garboj,
kion preskaŭ kor' ne sentas —
afliktiĝojn, kiuj vagas
tremetige kaj zigzagas
kiel fulmoj tra la brust'."

Mi ne scias, ĉu li eble kantis ankoraŭ plu. Ĉar mi estis kuŝiĝinta sur la benkon antaŭ la dompordo kaj pro granda laciĝo forte ekdormis en la varmeta nokto.

Kelkaj horoj eble estis pasintaj, kiam poŝtkorno vekis min, kiu longtempe blovis gaje en miajn sonĝojn, antaŭ ol mi povis tute rekonsciiĝi. Fine mi saltekstaris; la tago jam krepuskiĝis ĉe la montoj, kaj la matena malvarmeto fluetis tra ĉiuj miaj membroj. Nur nun mi ekmemoris, ke je tiu ĉi horo ni ja volis esti jam multe malproksime. Ha, mi pensis, hodiaŭ estas foje mi la vekanto kaj ridanto. Kiel sinjoro Guido elŝovos la dormplenan, buklohavan kapon, aŭdante min eksteran! Mi do iris en la malgrandan ĝardenon apud la domo apudegen sub la fenestrojn, kie miaj sinjoroj loĝis; mi ankoraŭ foje etendiĝis ege en la matenruĝon kaj gaje kantis:

VINTRO

Lamentas la arboj, ĉielen etendas
La brakojn skeletajn, frostante kaj treme
Ĝis fine la bona ĉiel' kompateme
Al ili ŝirmantan tapiŝon subsendas.

Kaj flokoj por blanka ĉiela kovrilo
Jen falas kaj falas kaj falas senĉese,
Ĝis sub ĉi-kovrilo, ŝirmanta karese,
La arboj ekdormas en bona trankvilo.

Kaj dormas la arboj kaj dormas la Tero,
Kaj kvazaŭ morttuko la neĝo sin sternas,
Sed sube jam ĝermas la nova espero.

Car nasko kaj morto senĉese alternas,
Kaj ĝermas la semo kaj falas la bero,
Sed vivas la Vivo, la Vivo eternas!

K. Kalocsay en „Streĉita kordo"

„Jam upupo krias nun;
proksimiĝas do la tago.
Plej bongusta estas dormo.
kiam levas sin la sun'."

La fenestro estis malfermita, sed ĉio supre restis silenta; nur la noktovento pasis ankoraŭ tra la vitobranĉoj, etendiĝantaj ĝis en la fenestron.

„Nu, kion do nun tio signifas?", mi kriis mirigite kaj kuris en la domon kaj tra la silentaj koridoroj al la ĉambro. Sed tie mi eksentis veran pikon en la koro. Ĉar kiam mi malfermegas la pordon, ĉio estas malplena: neniu frako, neniu ĉapelo, neniu boto. Nur la citro, kiun sinjoro Guido hieraŭ estis ludinta, pendis ĉe la muro; sur la tablo meze de la ĉambro kuŝis bela, plena monsaketo, sur kiu papereto estis gluita. Mi proksimigis ĝin al la fenestro kaj preskaŭ ne fidis miajn okulojn; vere estis surskribita per grandaj literoj: Por sinjoro la impostisto!

Sed kion ĉio ĉi utilis al mi, se mi ne retrovis karajn miajn gajajn sinjorojn? Mi ŝovis la saketon en mian profundan frakopoŝon; plum! Ĝi diris kvazaŭ falante en profundan puton, tiel ke mi vere sentis min kurbigata malantaŭen. Poste mi elkuregis, faris grandan bruon kaj vekis ĉiujn geservistojn en la domo. Ĉiuj tute ne sciis, kion mi volis, kaj opiniis min freneziĝinta. Sed poste ili miris ne malmulte, kiam supre ili vidis la forlasitan neston. Neniu sciis ion pri miaj sinjoroj. Nur unu el la servistinoj — tion mi konkludis kunmetinte ŝiajn signojn kaj gestikuladon — estis rimarkinta, ke sinjoro Guido, kiam hieraŭ vespere li kantis sur la balkono, subite laŭtekkriis kaj poste rekuregis rapide al la alia sinjoro en la ĉambron. Poste en la nokto foje vekiĝante, ŝi aŭdis de ekstere huffrapadon. Ŝi rigardis tra la malgranda ĉambretfenestro kaj vidis la ĝibhavan sinjoron, hieraŭ tiom multe parolintan al mi, sur blankĉevalo en la lunlumo galopanta laŭlarĝe tra la kampo, tiel ke li senĉese suprenflugis kelkajn ulnojn super la selo, kaj la servistino krucosignis sin; ĉar vidiĝis kiel fantomo rajdanta sur trigamba ĉevalo. Sed mi tamen nepre ne sciis, kion fari.

Dume nia kaleŝo staris jam longe jungita antaŭ la pordo, kaj la veturigisto senpacience blovegis en la kornon, kvazaŭ li volus krevigi ĝin; li ja devis esti je fiksita horo ĉe la sekvanta stacio, ĉar per ordonpapereto ĉio estis antaŭmendita je la minuto. Mi ankoraŭfoje kuregis ĉirkaŭ la tuta domo kaj vokis la pentristojn; sed neniu respondis. La homoj el la domo kunkuris kaj fiksrigardis min; la veturigisto blasfemis, la ĉevaloj spiregis. Mi, tute konsternita, fine saltas rapide en la kaleŝon, la gasteja servisto ĵetfermas post mi la pordon, la veturigisto vipklakas — kaj jen oni fortransportis min en la vastan mondon.

Kvina ĉapitro

Ni nun veturis tra valoj kaj montoj, tage kaj nokte ĉiam plu. Mi neniel havis tempon konsciiĝi. Ĉar kien ajn ni venis, tie la ĉevaloj staris jungitaj; mi ne povis paroli kun la homoj; tial miaj protestoj neniel helpis. Ofte, kiam en la gastejo mi ĝuste estis meze de manĝado, la veturigisto blovis la kornon; mi devis forĵeti tranĉilon kaj forkon kaj ree salti en la kaleŝon kaj fakte ja tute ne sciis, kien kaj pro kio mi nepre forvojaĝu tiel eksterordinare rapide.

Die Alfred-Rehtz-Ecke

Zu alt zum Lernen?

Du willst den alten Schädel nicht mehr plagen
Und legst die englische Grammatik fort?
Du meinst, du hättest keinen Kopf zum Lernen,
Und widmest deine freie Zeit dem Sport?
Zu Unrecht tadelst du die Britensprache,
Die weit verbreitet in der ganzen Welt,
Und viel, viel leichter ist als alle andern;
Nur wenig Regeln hat sie aufgestellt.

Nun denk' dir aus der englischen Grammatik
All das, was dich geärgert hat, mal weg!
Was meinst du? Könntest du es dann wohl schaffen?
Kämst du mit ihr dann doch wohl noch vom Fleck?
Wenn alles regelmäßig auszusprechen,
Wenn jeder Buchstab' aus dem Alphabet
Nur eine und dieselbe Lesart hätte —
Ob dann das Lernen wie geschmiert nicht geht?

Wenn, was du lernen mußt beim Konjugieren,
Ein Schema von zwölf Silben ist, nicht mehr,
Wenn überhaupt beim Verb kein Fehler möglich, —
Du nähmst vielleicht doch noch ein Lehrbuch her!
Wenn man die Wörter selber bilden könnte,
Indem man logisch sie aus Silben fügt,
So daß für alle Regeln dieser Sprache
Der Raum auf einer Karte schon genügt?

Du lachst und sagst mir, daß es das nicht gäbe,
So leicht sei keine Sprache in der Welt!
Du irrst dich, Freund! Die Sprache Esperanto,
Soeben hab' ich sie dir vorgestellt.
Die ist so leicht, daß man sich Mühe geben,
Ja, Mühe geben muß, nicht zu verstehn.
Du kannst den Grips und das Gedächtnis schonen,
Kannst bei dir selber in die Schule gehn.

Auf ein paar Blättchen lassen sie sich drängen,
Der Worte Wurzeln, die du nötig hast.
Du kennst gar viele schon im Fremdwortkleide,
Du lernst sie schnell, wenn du hübsch aufgepaßt.
Und wenn du dir den Vorrat Bildungssilben
Gemerkt hast, geht das Wörterbauen los:
Aus jeder Wurzel baust du ihrer viele.
Ein bißchen Übung — und du sprichst famos.

Willst du's versuchen? Hast du Mut bekommen?
Hab' ich dir wässrig schon gemacht den Mund?
Lern' unsre Sprache! Lernu nian lingvon!
Erobern bald wird sie das Erdenrund.
Sie macht dem Denkenden mehr Spaß als Mühe,
Weil strenge Logik ihren Bau erfand.
Mut! Hol' ein Lehrbuch dir für wenige Groschen!
Du hast sie besser niemals angewandt!

Escepte de tio ĉi tiu vivmaniero estis, por diri la veron, tute ne malŝatinda. Mi kuŝigis min, kvazaŭ sur kanapo, nun en tiun, nun en la alian angulon de la kaleŝo kaj konatiĝis kun homoj kaj landoj. Kaj kiam ni traveturis la urbojn, mi apogis min per ambaŭ brakoj sur la kaleŝfenestron, elrigardis kaj dankis al la homoj, kiuj ĝentile deprenis antaŭ mi la ĉapelojn; aŭ mi salutis kiel malnova konatulo la knabinojn ĉe la fenestroj, kiuj ĉiufoje tre miris kaj ankoraŭ longan tempon postrigardis min.

Sed fine mi tre ektimis. Neniam mi estis kalkulinta la monon en la trovita saketo; al la poŝtestroj kaj gastejestroj mi ĉie devis multe pagi, kaj antaŭ ol mi atendis tion, la saketo estis malplena. Komence mi decidis rapide elsalti el la kaleŝo kaj forkuri, tuj kiam ni traveturos solecan arbaron. Sed poste mi ree bedaŭris, lasi tiel sola la belan kaleŝon, per kiu mi alie estus forveturinta eble ĝis la fino de l' mondo. (Daŭrigota)

Max Butin

Promeno tra nia vortaro

(Aldono)

Agordi estas arbitre formita vorto de Zamenhof, kiu nepre volis eviti konfuzon pro plursenceco de vortradikoj. Tial li ofte faris arbitran, kelkfoje eĉ iom perfortan diferencigon de radikoj. Pri la interesa temo de la t. n. „ĝemelaj radikoj" referatis d-ro Wiener (Liverpool) en la revuo por lingvistiko „Esperantologio". Li opinias, ke „agordi" estas nenecesa kaj superflua, ĉar „akordigi" povas esti uzata en la senco de „agordi" kaj li mencias la Edinburgh-vortaron, kiu tradukas „ein Musikinstrument stimmen" per „akordigi". Nu, same superfluaj ŝajnas „ŝargi" apud ŝarĝi", kaj ili estas tamen netuŝeblaj vortoj el nia Universala Vortaro. Estus maljuste, kritiki pro tiu ĝemeleco nian majstron sciante, kial li procedis tiamaniere.

Alarmo estis origine la voko „al la batalilo!", fr. à l'arme (14a jarc.), it. all' arme.

Bombasto signifas nun ŝvelparolon, trograndigon en la parolo, Schwulst (von Wörtern). Longa vojo kondukis al tiu metafora senco, kiu origine estis tute alia. Bombasto deriviĝas de la persa pänbä, lat. bombacium = kotono; la angla (nun arkaikiĝinta) bomast estas „vato". Per kotono oni ŝtopis ekz. subŝtofojn, ŝveligante tiamaniere la amplekson de korpoj aŭ ajoj; poste la ŝtopŝvelaĵo mem ricevis la nomon „bombasto" kaj plusaltante oni venis de objekta al parola ŝvelaĵo. Menciinde estas, ke la mezepoka kuracisto Paracelsus emfaze kaj fiere titolis t. e. nomis sin: Philippus Aureolus Theophrastus Paracelsus Bombastus von Hohenheim. Eble tiu „bombasta" vortlisto kaŭzis, ke oni poste aplikis kaj uzis „bombaston" en la nuna signifo.

Buleo, germ. Bulle, estas papa dekreto. La vorto devenas de la latina „bulla" = veziko, do io rondforma kiel bulo, kapsulo k. a. Pro tio, ke la sigelo de la buleo estis bulforma, oni donis poste al la dekreto mem la nomon „buleo". Zamenhof intence formis „buleon" por eviti dusencecon, ĉar „bulo" kaj „buleo" esence havas la saman signifon, almenaŭ en la latina lingvo (bulla). La germana „Bulle" = virbovo ne estas parenca vorto.

Butero estas verŝajne skitdevena vorto, kiun la antikvaj grekoj popoletimologie transformis en „boutyron" t. e. bovina kazeo (bous = bovo, tyros = kazeo). El boutyron fariĝis latine „butyrum", it. Butirro aŭ burro, fr. beurre, germ. Butter. Arkaika kaj nun nur dialekte uzata esprimo por Butter estas „Schmer" (ŝmiraĵo); la skandinavaj lingvoj adoptis tiun radikon en sia „smör" = butero, slavlingve ĝi tekstas „maslo", hispanoj elektis „manteca" kaj „mantequilla" kaj portugaloj „manteiga". Ni do vidas, ke la radiko „buter" ne tre disvastiĝis en Eŭropo.

Cidonio, laŭ la urbo Kydonia en Kreto, greke kydonea, dore greke kydonion malon (pomo de Kydonia), lat. cotonea, it. cotogna, malnovgerm. chutina, germ. Quitte, fr. coing, ang. quince, hisp. membrillo, port. marmelo. Ĉi-lasta vorto altiras nian atenton, ĉar ĝiaj derivaĵoj estas la angla kaj franca „marmelade" kaj nia Marmelade (Fruchtmus). Origine marmelado konsistis nur el cidonioj. Forgesinte la veran signifon de „marmelo", oni kuiras marmeladon nuntempe, uzante diversajn fruktojn, fragojn, prunojn ktp.; la britoj nomas „marmelade" fruktkaĉon nur el oranĝoj kaj la ceterajn „jam". Gelato enhavas nur la duonsolidan fruktsukon (Gelee).

Dramo havas en Esperanto kaj en aliaj lingvoj plurajn signifojn, kvankam la origina estis simple „ago", el la greka verbo „dran" = fari, agi; derivaĵo estas „drasta", greke „drastikos" = fortege efika(nta), impresa(nta).

Fadeno, germandevena vorto en Esperanto, origine signifis tion, kion oni povis mezuri per etenditaj brakoj; ĝi do estis mezuro, kiun ni nun nomas „klafto" (Klafter); klafto = angle „fathom" kaj montras la saman vortradikon kiel „Faden". La homa korpo, t. e. ĝiaj membroj servis por fiksi mezurojn; ekz. futo kaj ulno.

Fromaĝo. — La vorto estas interesa pro tio, ke laŭ sia etimologio ĝi devus teksti „formaĝo". Ĝi estas prenita el la dua vorto de la latina „caseus formaticus", t. e. „formita". „Caseus" (kazeo) estas la densa solidiĝinta ne fermentinta parto de lakto, el kiu oni faras kaj formas fromaĝon. La itala lingvo ne permutis la du literojn o kaj r (Metathesis). — En unu el siaj „metamorfozoj" la poeto Ovid poezie nomas kazeon „massa lactis coacti" = maso da kuntirita lakto. Sekve de la fakto, ke la origina latina esprimo konsistas el du vortoj, la filinoj de la latina patrino utiligis parte la unuan, parte la duan vorton: fr. fromage, it. formaggio, hisp. queso, port. quejo; same ni derivas germ. Käse, nederl. kaas kaj ang. cheese de la latina „caseus".

Gendarmo, de la franca „gens d'armes" = viroj kun bataliloj, armitaj policanoj, germ. Gendarm, dialekte Schandarm (laŭ la franca prononco).

Gino. Britoj nomas grenbrandon aromigitan per juniperaj beroj „gin" laŭ la unua silabo de la latina „iuniperus", germ. Wacholder, nederl. genever, fr. genièvre, it. ginepro; la arbeton mem la angloj nomas „juniper-bush".

Idioto. — La greka „idiotes" signifis „privatulon" kontraste al „politikulo". Idiotoj estis nespertaj en ŝtataj aferoj kaj nesciantoj rilate politikon. Iom post iom la vortsenco ŝanĝiĝis kaj ĝeneraliĝis. Idioto = 1. homo senigita je inteligenteco pro cerbaj difektoj kaj 2. homo tute ne inteligenta, malsaĝega. — La tempoj aliiĝas konstante kaj kun ili ofte vortsignifoj; la lingvoj pruvas tion.

Kandidato. — En tiu vorto kaŝiĝas la latina „candidus" = blanka. Ĉiu, kiu aspiris oficon en la antikva Romo, devis prezenti sin al la senatanoj en togo blankigita per kreto. Hodiaŭ, male, la „blankigitoj" (candidati) estas nigre vestitaj. — Paradoksa!

Kaŝtano, lat. castanea, greke kastanea, it. castagna. La vorto devenas eble de la urbo Kastana, kiu eksportis tiujn fruktojn. Zamenhof prenis la vorton el la rusa lingvo (kaschtan); tial ni ricevis kaŝtanon kaj ne kastanon.

Komplimento. — „Pro la subita morto de via sola filo mi diras al vi miajn komplimentojn." Tiel ni legas ĉe franca literaturisto el la 17a jarcento. En la sama epoko la germanoj transprenis la vorton el la franca lingvo, kiu ĝin ĉerpis el la itala. Nuntempe ŝajnas al ni absurde, diri komplimentojn al funebranto, sed en la tiama Francujo estis kutimo, komplimenti je ĉiuj okazoj, ĝojigaj kaj malĝojigaj, ĉar „komplimento" signifis origine „plenumon" (de la postuloj de ĝentileco). En la 18a jarcento okazis signifoŝanĝo de la vorto; komplimentoj iĝis flataj, gratulaj vortoj kaj ĝentilaj formuloj: jem. ein Kompliment machen.

Kosti, de la mezlatina „costare" (lat. constare). „Constat" = „estas konstatite" (oni konstatas) kaj ankaŭ „kostas", ekz. „constat mihi" = kostas al mi. Multekosta = altpreza, kara. „Kara" havas du signifojn: „kosta" (multekosta) kaj „amata", sed ne en ĉiuj lingvoj. Lingvisto esploris 52 lingvojn, el kiuj nur en 19 „kara" kaj „kosta" samsignifas. Laŭ la latina ekzemplo do ne estas mirige (lat. „carus"), ke en la romanidaj lingvoj „kara" havas du signifojn, krome en la germana, angla, greka, estona, finna, litova kaj en la slavaj lingvoj escepte de la serbo-kroata. La germana „teuer", ekz. en „mein teurer Freund" iom post iom arkaikiĝis; ni nun kutimas diri: ein teures Kleid kaj ein lieber Freund.

Levkojo (floro) = blanka violo, el la greka lingvo. „Leukos" = blanka kaj „ion" = violo. Violo kaŝiĝas ankaŭ en „jodo" (greke „ioeides" = violkolora) pro la koloro de ties vaporoj.

Libelo (insekto), de la latina „libellula" = malgranda pesilo, ĉar, flugante, la besteto etendas siajn diafanajn flugilojn horizontale, pesilsimile.

Marmoto estiĝis el la latina „mus montis" = montmuso, ekzakte: el la vulgarlatina „mure" kaj tiu vorto el la akuzativa formo „murem" de „mus". Por nelingvistoj mi devas mencii, ke ne la klasika, sed la vulgara latina lingvo iĝis patrino de la romanidaj idiomoj, kiuj formis siajn esprimojn el la akuzativa kazo. Nur la romanĉa (retoromana)

lingvo tre klare konservis la originajn vortelementojn en „murmont"; la litero r pruvas la devenan fonton, alie ni dirus hodiaŭ „masmoto" kaj „Musmeltier". Fr. marmotte, it. marmotta, hisp. marmota. Tiel aliiĝas vortoj dum longaj periodoj, kaj la origino ne plu rekonebliĝas por nefakulo. Malnovgermane marmoto tekstis „murmuntin"; miskomprenante la finaĵon „tin", oni formis poste „Murmeltier", same kiel Elentier, Tigertier, kvankam ĝi tute ne signifas „Tier". Do „Murmel" sufiĉus teorie, sed lingvoj ne estas distilataj en retortoj; la lingvouzo sole estas kompetenta, kaj laŭ ĝi ni kutimas hodiaŭ diri pli kaj pli Hai kaj Wal, ne plu Haifisch kaj Walfisch pro neneceso aŭ malĝusteco de tiu dua vortparto.

Naiva originas en la latina „nativus" = denaska, laŭnatura. La franca lingvo eliminiis la literon t, ankaŭ aliaj lingvoj; nur la itala ĝin konservis (nativo). Naiva = angeboren, natürlich, unbefangen, treuherzig, kindlich, kaj laŭ Esperanta difino: tute laŭnatura, senartifika, sensperte malkaŝema kaj kredema kiel infano; la origina signifo do pliampleksiĝis.

Oranĝo. Komence oni konis nur la maldolĉan oranĝon, kies lulilo balanciĝis en Persujo; ĝia nomo: sanskrite naranga, perse naräng, arabe naranĝ. Veneciaj komercistoj, kiuj negocis per la oreruĝaj fruktoj, nomis ilin „naranza", italoj „arancia", hispanoj „naranja", portugaloj „laranja" kaj francoj „orange". En la 16a jarcento oni importis el la suda Ĉinujo la dolĉan oranĝon (sudĉine: güe dsi), kaj la jam konata nomo estis donata nun ankaŭ al ĝi. En la 18a jarcento nederlandanoj grandkvante disvendis la ĉinan oranĝon, nomante ĝin „appelsien" t. e. pomo el Ĉinujo aŭ ĉina pomo, ĉar la malnova nomo ne estis „China", sed „Sina". Scienculoj, sin okupantaj pri ĉina lingvistiko, literaturo ktp. estas nomataj germane „Sinologen". Hodiaŭ „oranĝo" estas germ. Apfelsine, nederl. sinaasappel. En dokumentoj el pasintaj tempoj ni trovas: pomme de Sine, pomme de Chine, pomme d'orange (1314), Sineser Apfel (1697), Chinaapfel (1741), Goldorange (Goethe). El la itala „arancia" kaj „pomo" estiĝis la mezlatina „pomoranica" = pomoranĝo = Pomeranze. La etimologio de „oranĝo" pruvas, ke la unua silabo de l' vorto ne signifas „oron", kvankam la supozo estus pravigebla pro la orflava koloro de la frukto. La ŝajno ofte trompas.

Polvo - Pulvo - Pulvoro - Pudro, de la latina pulverem (akuzativo) kaj la mezlatina pulvus. Ĉi-kaze ni mirigite konstatas, ke Esperanto superas aliajn lingvojn pro radikabundo. Francoj kaj italoj posedas nur unu esprimon por ĉiuj kvar Esperanto-vortoj: poudre kaj polvere (la franca „poussière" estas moderna kromformo). Ni admiras nian majstron. Ĉu ni sekvas la vojon de li montritan: Ĉu ni senrezerve obeis lian leĝon pri nepra klareco? Ĵetu nur etan rigardon en la Plenan Vortaron por konstati, ke la plursignifeco de Esperanto-radikoj altgrade multiĝis, hibridigante nian valoran vortkapitalon. Tamen plursenceco ne ĉiam malutilas, kie ĝi en metaforoj kongruas kun tiu de la naciaj lingvoj, ekz. en la frazoj: hieraŭ mi vidis dramon en la teatro kaj: hieraŭ mi vidis dramon en la hejmo de mia najbaro. Obstine kontraŭstarante la postulojn de lingva evoluo per neakcepto de necesaj novaj radikoj (neologismoj), ni strangolos perforte nian lingvon. La ora meza vojo estas kaj restas la plej bona ĉiukaze . . .

(Finota.)

LINGVA KONSILEJO

Aktuala terminareto

albern stultnaiva
Allstrom ambaŭspeca kurento
Anker (Magnet~) armaturo
Eilgut rapidfrajtaĵo
elektrischer Ofen elektra hejtilo. ~ **Kocher** elektra kuirilo
enteignen malproprigi
Erde (elektr.) terkonekt|o. **~n** -i
Expreßgut ekspresfrajtaĵo
Fastnachtsdienstag grasa mardo
Fern|**gespräch** neurba telefonaĵo, distanc-. **~sehen** televid(ad)o
Gehäuse kesto, ujo
Gemeinschafts|**antenne, -empfang, -sendung** komuna (kolektiva) anteno, ricevo, sendaĵo
Gleichstrom kontinua kurento
Gongschlag tamtam-sono, -bato
Isolierband izola bendo
Heißmangel hejtata kalandrilo
Kaschemme krimulrestoracio
Konfetti konfetoj
Mannschaft (Spiel~) taĉmento, trupo
Nachrichten(dienst) inform|oj (-servo)
Oberleitung supra kondukilo
Obus kondukila aŭtobuso
Orts|**gebühren** (~satz) urba tarifo, enurbaj kostoj. **~gespräch** (en)urba telefonaĵo
Pils(ener) pilzena biero
Rosenmontag karnavala lundo
Saatkartoffeln plant-terpomoj
Schlager mod|kanto, furor-
Schönheitskönigin belec|reĝino. **~konkurrenz** -konkurso
Schwund (Rundf.), **Fading** fado, automatische ~regelung, ~ausgleich, aŭtomata fadkompensado
Spielschar ludgrupo, teatro-
Sprechspur parolspuro
Stummabstimmung (Rundf.) muta agordo
Telefon|**netz** telefona reto. **~anschluß** t. (ret)konekto
Unterhaltungsmusik distra muziko
Wackelkontakt malbona kontakto
Wechselstrom alterna kurento
Weltraumfahrzeug interastra veturilo
Zähler (Elektrizitäts~, Strom~) kurentmezurilo

Druckfehlerberichtigung:
durchleuchten radioskopii

Pro pluraj miskomprenoj mi petas noti, ke mi ne estas identa kun s-ro Wilh. Wingen, sed nur ties filo.

Hans Wingen.

Sidiĝi

La artikolo de s-ano Butin en n-ro 12/51 de E.-P. estas prava kaj trafa, do ne bezonas pluan komenton. Sed ŝajnas al mi konvene, ekzameni, kiel d-ro Zamenhof rilatis al tiu demando.

En 1904 aperis la vortaro Esperanta-germana de H. Jürgensen. Pri ĝi Zamenhof skribis al „multaj demandintoj": „. . . se oni deziras scii, kian tradukon mi **persone** rekomendus por tiu aŭ alia vorto mi konsilas, serĉi en la vortaroj eldonitaj de la firmo Möller & Borel, ĉar tiuj ĉi vortaroj estas redaktataj de mi mem." (Leteroj I, pĝ. 334). Tiu vortaro donas la jenan klarigon: „-iĝ-, Suffix. . . . werden, in einen Zustand gelangen; die Wortverbindungen mit -iĝ entsprechen bisweilen deutschen reflexiven Verben, sind jedoch wohl von dem kausativen, reflexiven: sin . . . -igi zu unterscheiden; z. B. akriĝi, scharf werden; blindiĝi blind werden, erblinden; sin blindigi sich blenden usw." (Kausativ = verursachend, begründend, die Ursache bezeichnend).

Tamen Zamenhof pluuzis kutime la formon „sidiĝi" ankaŭ en tiuj kazoj, kie la ago estas konscia kaj volita, do kaŭzativa. La motivo de tiu nekonsekvenco estas nete oportunisma. Tio evidentiĝas el lia jena „lingva respondo" el la jaro 1906: „Vi estas prava: anstataŭ ‚sidiĝu' estus pli bone diri ‚sidigu vin' aŭ ‚eksidu'; tamen ĉar la formo ‚sidiĝu' jam de tre longe estas uzata preskaŭ de ĉiuj Esperantistoj, tial ĝi fariĝis jam ‚Esperantismo' kaj nomi ĝin eraro oni jam ne povas."

La granda kaj daŭra zorgo de Zamenhof pri la kontinueco de la lingvo kaj lia timo antaŭ la tiama reformemo do instigis lin, konservi iujn esprimojn eĉ tiam, kiam ilia nelogikeco aŭ nekonsekvenco estis evidentaj. Hodiaŭ, kiam multaj nealvokitaj plibonigulo arbitre produktas novajn „Esperantismojn", mi kredas, ke ni havas grandan intereson, strebadi lingvan logikon tiom, kiom tio estas ebla kaj konvena. (Por interpreti mian aludon per aktuala ekzemplo, mi nur citu la ĉi-emulojn kiuj anstataŭigas la montran adjektivon resp. pronomon „tiu" per la partikulo „ĉi": dieser Mann = ĉi-viro.)

La sufikso -iĝ- estas ofte misuzata por esprimi statodaŭron anstataŭ ŝanĝon de stato, ekz.: la afero baziĝas sur malnova traktato. Tiun eraran uzon Zamenhof evitis. Li skribis ekz.: la kontrakto estas bazita sur erara fundamento, kaj, aliloke: la afero estas bazita sur interkonsento. Aliaj opinias, ke -iĝ- estas oportuna pasiva formo, eble laŭ la formulo: la patro batas la filon — la filo batiĝas (anstataŭ: estas batata), aŭ: la knaboj interbatiĝis (anstataŭ: sin interbatis).

J. Sommer.

Stenografio sur novaj vojoj

kaj kio ĝojigas esperantistan koron

Ideon, vorton en rapid'
konkrete figuradi,
fre serioze serĉis mi
rimedon elpensadi.
Utilo ĉies estis cel'
de mia klopodado.
Ho, sekvu sur la sama rel'
de l' disĉiplar' penado!

Tiuj, kiuj iam lernis la belan arton de la Germana „Patro de la stenografio" (aŭ, kiel li mem ĝin nomis: arto de la parolsignado) Francisko Ksavero Gabelsberger, certe rekonas en la ĉi-supraj versoj lian devizon:

Idee und Wort im Flug der Zeit
ans Räumliche zu binden,
sucht' ich in ernster Tätigkeit
ein Mittel zu ergründen.
Und was ich fand, das gab ich hin,
um Nutzen zu verbreiten.
Oh, möge stets ein gleicher Sinn
auch meine Schüler leiten!

La sistemo de l' majstro Gabelsberger estis la unua, kiun mi lernis kaj, laŭ mia opinio, sufiĉe kuraĝe sukcesis „trabori la monton granitan". Jam malproksima estas tiu tempo de la gimnaziaj jaroj. De tiam mi provis ankoraŭ kelkajn aliajn sistemojn, lernis, ekzercis, forgesis; nun mi haltas ĉe Intersteno, sed . . .

Neniu „sed", kiel vi pensas, ĉar ĝi plene kontentigas min, same kiel aliajn kontentigas ilia alia sistemo. Tamen, mi demandis min, ĉu ni jam staras sur la lasta ŝtupo? Evidente ne, ĉar . . . nu, mia amiko W. W. estas „kulpa". Li invitis min al prelegeto pri stenografi-maŝino kiu (ne la maŝino sed la prelego) estis farata, ho ve! en franca lingvo, cetere en bela, eleganta, sonora franca lingvo el la buŝo de vera „Madame". Mi kaptis de ŝiaj paroloj kiom mi povis, ne ĉiom, bedaŭrinde ne, sed tamen multon. Ho, mi forgesis diri, pri kio ŝi parolis: Pri tio kio superas la stenografion. Ankaŭ ĉi-kampe la triumfo de la maŝino!

Ĉar, ĉu stenografi kaj samtempe „tajpi" ne estas la supro? Kaj, cetere, same rapide aŭ eĉ pli rapide ol stenografoj, kun la diferenco, ke la skribitaĵo estas relegebla de ĉiu alia iom sperta pri tiu maŝino?

Nun ne imagu, ke tiu maŝino estas monstro je aspekto kaj formato, kun amasego da klavoj, risortoj, leviletoj kaj similaj teknikaj aparateroj, de ega amplekso. Neniel! Facile oni povas enŝovi la tutan maŝineton en ordinaran aktujon, kaj ĝia pezo apenaŭ atingas kilogramon.

Kiel aspektas do tiu mirinda ileto? Vi certe jam vidis simplan adicimaŝinon kun rulbendo el papero, kie aperas la adiciataj sumeroj kaj poste la sumo. Nu, same tiel, 21 klavoj sen ia surpreso, aranĝitaj en du vicoj, tiel ke ĉiu mano facile povas tuŝi po 10 el ili. La tuŝado apenaŭ kaŭzas bruon, je distanco de kelkaj paŝoj jam nenio estas aŭdebla. La fingroj de la skribanta sinjorino, al kiu oni diktis malfacilan franclingvan tekston, pre-

mis tute delikate la klavaron, kaj la paperbendo supre eliĝanta iom post iom plu elŝoviĝis. Kiam ŝi poste laŭte relegis tiun malfacilan sciencan tekston, flue kaj senhezite, ŝi certe trovis la admiron de multaj ĉeestantaj stenografoj kaj stenografinoj ne tute perfektaj (inter ili mi), por kiuj la posta relegado estas ofte antaŭtimiga fantomo, kiu jam kaŝe sidas sur la papero dum la skribado.

Kaj kiel aspektis tiu paperbendo? Nu, vi bonvolu rigardi la ĉi-apudan bildon. Vi legos sur ĝi (mi aligis kelkajn literojn, ekz. d por t kaj v por f, vidu ĉi sube!) la tekston de l' komenco de la Himno. Vi miras? Jen, kiel tio okazis. Post la prelego mi aliris por demandi „Madame", ĉu oni povas stenotipi ankaŭ itale aŭ hispane aŭ — tio nepre devis veni! — Esperante. Kaj jen okazis mirakleto. „Madame" komencis paroleti en nia lingvo, malrapide, ne tute korekte. Ŝi senkulpigis sin dirante, ke ŝi de post la UK en Kembriĝo (1907!) ne plu ekzercis Esperanton, sed ke ŝi tie vidis D-ron Zamenhof. — En loko, kie mi estis neniam antaŭe, ĉe hazarde vizitita prelego, de sinjorino kiun mi neniam antaŭe vidis nek verŝajne revidos, mi aŭdis nian lingvon. Kaj ŝi deziris ke mi diktu al ŝi Esperantan tekston. Kaj mi diktis la komencon de la Himno, kiel vi apude vidas. La paperbendon ŝi poste deŝiris kaj donacis ĝin al mi kiel rememoraĵon.

Kelkaj klarigoj: Ĉiu linio estas silabo. Oni skribas nur fonetike. Por la franca lingvo P = p aŭ b, T = t aŭ d, F = f aŭ v. Oni povas kunigi silabojn: TLA = de la. Kelkaj literoj havas specialan formon, por helpi ĉe la relegado. Legante la stenotipaĵon, bonvolu ne forgesi, ke la sinjorino, kiel ŝi diris, neniam ĝis nun stenoskribis per sia maŝineto Esperanton kaj preskaŭ forgesis ĝin. La maŝinon eltrovis la edzo de tiu s-ino Grandjean, kaj ŝi ĉirkaŭvojaĝadas por ĝin diskonigi. En Francujo ĝi estas uzata jam en centoj da entreprenoj, de politikistoj, sciencistoj ktp. Por komerce interesitaj homoj: La prezo en Germanujo estos proks. inter 300 kaj 400 gmk.

Kaj kion mi diru kiel stenografo? Supozeble la tekniko helpe de tiaj inventoj forigos la ĝeneralan uzadon de stenografio, se maŝine la sama sukceso estas pli rapide, pli facile kaj pli racie atingebla ol per la ordinara stenografado. Tamen, por la persona kaj privata uzo ktp. oni neniam povos malhavi la ĝisnunan mallongskribadon. La aŭtomobilo ankaŭ ne komplete ekstermis la fiakron!

B.-K.

Sinjo

la Esperanto-knabino, pri kiu vi legis en EP n-ro 10/1951, dum sia vojaĝo de Nederlando al Berlino restos ankaŭ kelkajn tagojn en la okcidenta parto de nia Respubliko. Ni esperas, ke ŝi rakontos al ni en EP pri la multaj belaĵoj, kiujn ŝi vidis post la Munkena kongreso, kaj pri siaj travivaĵoj en la diversaj landoj.

La EP-Raketo

ne eksplodis ie nek perdiĝis aŭ malaperis, sed ĝi troviĝas nun en Sud-Ameriko kaj de tie daŭrigos sian flugon aŭ Japanujon aŭ Aŭstralion; tion montros la plej proksimaj raportoj. Espereble ni povos sciigi ion pli detalan jam en la venonta numero.

Kantu *karnavalajn* kantojn Esperante!

Nun estas karnavala tempo, tempo dum kiu regas laŭta ĝojo, petola plezuro, amuzemo, dancado kaj kantado. Ni Esperantistoj, almenaŭ inter ni, volas festi la karnavalon ankaŭ sub la signo de la verda stelo, kaj ni esprimas tion plej bone per kantoj en Esperanto. Bedaŭrinde la verkistoj kaj poetoj karnavalaj ankoraŭ ne verkas siajn poemojn kaj kantotekstojn en nia lingvo; do ni devas mem helpi nin per tradukitaj kantoj, almenaŭ per rekantaĵoj Esperantigitaj, ĉar plej ofte nur ili estas kune kantataj de ĉiuj.

Karnavalo, pro siaj multaj plezur-aranĝoj, ne malofte estas iom multekosta; tial estas tute kompreneble, ke en ĉiu societo eksonas:

Kiu pagu tion, kiu mendis ĝin?
Kiu havas multan monon kaj oferas sin?

Sed ni supozu, ke ni havas tiun „multan monon". Tiam ni povas mendi bonan botelon da vino; sed

Se trinkas vinon vi
atentu la jaron!
Se kisas inon vi
atentu la jaron!
Car estas grave kaj ĉiam prave:
Maljuna vin', sed juna belknabin'!

Nun ni estas jam meze en la karnavala bonhumoro, kaj al ĝi apartenas kompreneble ankaŭ la kisado. Kiu plej bone scias kisi? Nu, aŭskultu:

Tiel bone scias kisi
la knabinoj en Rejnland',
ke vi ŝatas ĉiam vivi
ĉe la bela Rejna strand'.

Sed iu ja devas esti kulpa pri tio, iu aŭ io. Nu, ni estu ĝentilaj kaj kulpigu „ion", nome:

Jes ja, la amo, la amo ja kaŭzas ĝin,
ke sola estas mi kaj arde sopiregas vin.
Revenu baldaŭ, denove mi ĵuras ĝin,
ke vi, knabin', tutsola feliĉigas min.

Dank' al Dio, ŝi fine revenis, kaj nun ili sidas kune tiel malvaste kiel eble, kaj li rakontas al ŝi pri siaj gloraj faroj kiel indiano, ĉar li ja portas tian kostumon. Ĉe kiuj kruelaj triboj li estis? Nu:

Sovaĝaj indianoj de Titikaka-mar',
sovaĝaj indianoj ja fumis en tendar'
kalumeton post lukto kiu ajn.
Sed ĉe ni ne, sed ĉe ni ne, —
Oni fumas ĝin nur en ĉiela hejm'.

Sed oni ne povas dum tri tagoj esti nur indiano. Oni... sed tio estas nur afero duagrada. La ĉefafero tamen restas la... amo:

Tri tagojn gajajn amu min tutkore,
bonvolu kisi min, jen via dev'!
Ni dancu, amindumu ĉiuhore,
sed mia nomo restu por vi nura rev'!

Guste kiel ĉe Lohengrino, ĉu ne? Sed ŝajnas, ke ankaŭ la amindumado kun la kisado kaj tiel plu ne povas kontentigi por ĉiam. Do eliĝas el la jam plenraŭka gorĝo tiu ĝeln-deziro:

Forpelu la amon mi por ĉiam,
tiun amon puŝos mi nun for!
Ĉe la ermitoj kisos mi neniam,
ĉar pro la am' suferas mia kor'.

Tamen, ne estas nepre necese, ke oni tuj iru al ermitejo. Oni povas antaŭ tio turni sin ankoraŭ al aliaj plezuroj. Ekzemple, kial ne fari beletan veturon per unu el la Rejn-ŝipetoj, precipe vespere, ĉe la flanko de bela knabino? Kaj la steloj supre sendas siajn radietojn sur la ondojn de la trankvile fluanta Rejno-riverego.

Hajdevicka, ŝipestro vi!
Sur Rejn-ŝipeto sidas mi kun ŝi.
Ni ŝunklas, ŝercas, amindumas,
dum super ni la steloj lumas.
Hajdevicka, ŝipestro vi!
Ja tian ŝipveturon ŝatas ni!

La nokto estas tro bela! Miloj da steloj inspiras ankaŭ tiaspecan admiran „himnon":

Mi vidas stelojn, ja multajn stelojn,
Neniu estas tiel bela kiel vi!
Ho, aŭdu petojn, ja miajn petojn:
Sen via kiso en la nokt' ne dormos mi!

Kaj la milda nokto ĉiujn kovras per sia vasta malhele-blua stelumita mantelo.

La kantotekstojn tradukis A. B. kaj M. Sutoro

Bal-flustrado

„Ho, vi dancas, kiel princo!"
„Ne tute, sed kiel grafo."
„Ĉu vere? Do vi estas eble stenografo, aŭ fotografo, aŭ eble eĉ litografo?"

Krucvort-enigmo



Horizontale: 1. Rivero en Ruslando, 3. rivero en Italujo, 4. adverbo pliakcentanta, 6. k. s. por kobalto, 8. verba finaĵo, 10. centra parto de rado (r), 12. persona pronomo, 14. franca artikolo, 15. birdo el la speco de gruoj, 17. sufikso por naskito, 18. prepozicio de direkto, 19. marŝi (r), 20. konjunkcio, 21. plej-elektitaro (r), 23. pronomo, 24. k. s. por zinko, 25. neoksidiĝema metalo (r), 27. k. s. por natrio, 28. part(et)o.

Vertikale: 1. Konjunkcio signifanta „sekve", 2. maljes, 3. prepozicio, 5. parolata demandosigno, 6. fiinsekto, 7. danco (r), 9. iama itala monero (r), 11. k. s. por berilio, 13. eŭropa lando, 16. sufikso, 17. ŝanĝe-brila 18. ne tio sed..., 19. sufikso, 20. kokina produkto (r), 21. franclingve: kaj, 22. mallongigo por: tiel nomata, 26. prefikso, 27. anglalingve: ne k. s. = kemia signo (r) = radikvorto.)

Ho. Tero.

Joseph F. Berger

NIKO KAJ NINA

Postkursa legolibreto originala

Unser neues Verlagserzeugnis ist zur Auslieferung bereit. Es soll die Kursusteilnehmer zusammenhalten durch seinen sprachlich immer schwieriger und inhaltlich immer spannender werdenden Text. Aber jeder perfekte Esperantist wird seine helle Freude an diesem neuen Bändchen haben. Es ist original in Esperanto geschrieben und mit zahlreichen Zeichnungen belebt. Max Butin gab das Vorwort dazu.

Format 12 x 19 cm, 70 Seiten mit 15 Zeichnungen im Text, in schönem zweifarbigem Kartonumschlag. Preis 2,40 DM zuzüglich 10% für Porto und Verpackung.

Durch alle Buchhandlungen

Esperanto-Abteilung
der Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn

Kelkaj recenzoj el la internacia Esperanto-gazetaro

. . . estas bonega lernolibro, kion cetere jam pruvas la fakto, ke jam aperis latria eldono . . .
Nederlanda Esperantisto

. . . Ni jam ŝuldas multon al tiu presejo pro ĝia eldono de la bona gazeto Esperanto-Post. Ĉi tiu lernolibro atingas la altan nivelon, kiun ni atendas de ĉi tiu firmo . . .
Esperanto Internacia

. . . Ĉi tiu verkaĵo estas la rezulto de multjaraj klopodoj kaj spertoj: senhezite ĝi povas esti citata kiel unuaranga lernolibro. Plaĉa prezento, klara superrigardo, bela preso, bona papero . . . Franca Esperantisto

. . . Oni tuj vidas, ke ĝi estas verkita de spertaj instruistoj . . .
Svisa Espero

Die neuen Kurse mit unserem Lehrbuch „Wir lernen Esperanto"

1951 haben Tausende dieses Buch mit Erfolg benutzt.

80 Seiten, mit Wörterverzeichnis und Merkblatt für Kursusleiter, 2.- DM zuzüglich 10% für Porto und Verpackung.

Für Kursusleiter und Selbstlerner Schlüssel dazu 80 Pf zuzüglich Porto.

Durch jede Buchhandlung oder direkt bei der

Limburger Vereinsdruckerei Limburg/Lahn

Schnell u. sicher

lernen Sie Esperanto im

Fernunterricht

A: Anfangsgründe, B: Wiederholung, Fortbildung. — Näheres durch

L. Funken, dipl.-instr., Villenpromenade 5, (22 b) **Bad Ems.**

Unsere Werbeblätter sind beliebt!

Esperanto auf einem Blatt
bis 100 Stck. 4 Pf, bis 500 Stck. 3,5 Pf, über 500 Stck. 3 Pf (bisher 25 000 verkauft)

Unser Weg: Esperanto
bis 500 Stck. 3 Pf, über 500 Stck. 2 Pf (10 000 verkauft)

Wir rufen Euch, Jungen und Mädel
bis 1 000 Stck. 5 Pf, über 1 000 Stck. 4 Pf (5 000 verkauft)

Gegen Esperanto?
bis 1 000 Stck. 5 Pf, über 1 000 Stck. 4 Pf

Benutzen auch Sie zur Werbung für Esperanto-Kurse diese beliebten Hilfsmittel!

Esperanto-Abteilung der Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn

Solvo de la silab-enigmo el n-ro 1/52

1. ArSenalo, 2. LiAno, 3. LeDo, 4. OrNamo, 5. KrEpo, 6. OnStepo, 7. DiIno, 8. OrNitologo, 9. LiNO, 10. ObJekto, 11. RaOul, 12. ArLekeno, NSU, 14. InKo, 15. MiOpa, 16. AnAlfabeto, 17. NoMado, 18. OkRo, 19. NuAnco, 20. ElCerpi, 21. TrOmbono, 22. EnKeto, 23. NeOlogismo, 24. DaLio, 25. AgLo, 26. SiAmo = AL LOKO DOLORA NI MANON ETENDAS, AL LOKO ĈARMA OKULOJN NI SENDAS. (Zam. Prov. 142.)

Verlag und Druck: Esperanto-Abteilung der Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg. Herausgeber: Ludwig Goppel, Limburg/Lahn. Hauptschriftleiter: Joseph F. Berger, Köln-Riehl, Ehrenbergstr. 1. Nachdruck nur mit Genehmigung der Schriftleitung. — Bezugspreis: Vierteljährlich 1,50 DM zuzüglich —,12 DM Zustellungskosten. Erfüllungsort ist Limburg/Lahn. — Alle Zuschriften für die Redaktion an Joseph F. Berger, Köln-Riehl, Bestellungen und Anschriftenänderungen nur an die Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn, Diezer Straße 17, Postscheck-Konto: Frankfurt am Main, Nr. 123 82; Bank-Konten: Limburger Bank, Kreissparkasse Limburg, Nassauische Landesbank, Filiale Limburg.

Werben Sie neue Abonnenten für die **E. P.**

6,60 **kostet der gebundene Jahrgang 1951 der Esperanto-Post**

Nur eine kleine Anzahl des letzten Jahrgangs unserer Zeitschrift wurde zu einem Buch gebunden, aus dem Sie die Fülle des in einem Jahr gebrachten Materials sehen können. Schenken Sie Ihren Freunden und Korrespondenten dieses „Jahrbuch"! Die Versandkosten sind im Preis enthalten.

Esperanto-Abteilung der Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn